

Corde natus ex Parentis

Brevier-Himno

Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 1-an de januaro > Sankta Dipatrino Maria > vespera laŭdo (1)
Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 1-an de januaro > Sankta Dipatrino Maria > vespera laŭdo (2)

*Corde natus ex Parentis
ante mundi exordium
Alpha et Omega vocatus,
ipse fons et clausula
omnium quæ sunt, fuerunt
quæque post futura sunt.*

*Corporis formam caduci,
membra morti obnoxia
induit, ne gens periret
primoplasti ex germine,
merserat quam lex profundo
noxialis tartaro.*

*O beatus ortus ille,
Virgo cum puerpera
edidit nostram salutem
feta Sancto Spiritu,
et puer redemptor orbis
os sacratum protulit.*

*Ecce, quem vates vetustis
concinebant sæculis,
quem prophetarum fideles
paginæ sponderant,
emicat promissus olim:
cuncta collaudent eum!*

*Gloriam Patri melodis
personemus vocibus;
gloriam Christo canamus,
matre nato virgine,
inclitoque sempiternam
gloriam Paraclito.*

Amen.

El la Patra kor' naskita
antaŭ mondo, antaŭ temp',
Li, la Alfo kaj Omega,
Li, la fonto kaj la fin'
de l' estanta, de l' estinta,
de l' estonta, post futur':

Li sin per kadukaj membroj
vestis, per mortonta korp',
por nin savi de l' heredo
pereiga de Adam',
de l' detrua leĝ' de morto,
de l' profundo de Tartar'.

Ho beata, kiu venis
el la sin' de l' Virgulin'!
Ŝi, graveda de l' Spirito,
portis bebon, naskis Lin.
Kaj la knabo sin elmontris
redemptor' de l' tuta mond'.

Viziuloj antaŭsente
en pratemp' prikantis Lin.
Lin la paĝoj de l' profetoj
antaŭdiris kun fidel'.
Jen la Promesit' ekfulmas.
Kune ĉio laŭdu Lin.

Gloron per bel-sonaj voĉoj
al la Patro donu ni.
Laŭdon ni al Kristo kantu,
kiun naskis Virgulin'.
Levu gloro sin eterna
al la fama Paraklet'.

Amen.